


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Partoprenantoj de la 65-a IFEF kongreso

2
2013 57-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervoĵista Esperanto-Movado
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500

al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

2-a kovrilpaĝo: I. Gulyás: Eksteraj protektantoj

17. I. Gulyás: IFEF kongresis en Francio

23. I. Gulyás: 13+1 demandoj (Romano Bolognesi)

31. J. Patay: Fakaj informoj

33. Nekrologo: József Cziboly

EKSTERAJ PROTEKTANTOJ

Dum la lasta tagordo de la ĉijara ĝenerala kun-
sido de nia asocio temis pri tio, ke eksteruloj de
nia movado propagandas la hungaran fervoĵistan
Esperanto -movadon.

La plej grava protektanto estas la landa FISAIC-
organizaĵo (VOKE), kiu helpis al ni kaj morale,
kaj finance, eĉ ĝi fanfaronis pri nia efika agado.
VOKE havas novan estraron, kies membroj
promesis al ni la kontinuan apogon.

Kelkaj fakgrupoj (Pécs, Nyíregyháza, Győr)
raportis pri la helpoj de la fervoĵaj kulturdomoj,
kiuj certigas al ili ejojn por kunveni, organizi
ekspozicion pri Esperanto ktp. La kulturdomo
de Pécs organizis "Malfermitan Tagon", kies
kadro oni prezentis la Esperanton, eĉ
propagandis tion.

La gvidantino de la Ĉefurba Filio-Biblioteko jam
plurfoje donis eblecon por E-programoj. Al tiuj
programoj ŝi invitis esperantistojn, kaj ankaŭ
neesperantistajn interesulojn.

S-ino Ilona N. Pető Szigethy - fondinta membro
kaj estrino de la "Szigethy Literatura kaj Arta
Rondo" - propagandas E-on pli ol dek jaroj. En
ĉiuj aperintaj eldonaĵoj troveblas artikoloj,
informoj pri Esperanto, eĉ fervoĵistaj
esperantistoj verkas en tiuj eldonaĵoj altvalorajn
skribaĵojn. (Jáki, Domokos, Patay ktp).

En la kadro de la Literatura kaj Arta Rondo
okazis memorprogramo pri Ferenc Jáki, en
kiu partoprenis multaj fervoĵistaj, kaj
nefervoĵistaj esperantistoj.

Kelkaj neesperantistoj verkas artikolojn al nia
faka revuo HFM (F. Visi, K. Orosz, J. Komáromi
ktp). Multaj esperantistoj - kiuj ne estas
membroj de nia asocio - sendas al ni vere
altnivelajn kaj diversajn skribaĵojn.

Jam dufoje organizas Landan Amikan
Fervoĵistan Renkontiĝon nefervoĵista organizo.
En 2011 la lokaj esperantistoj en
Hódmezővásárhely organizis grandsukcesan
Renkontiĝon, kaj en la nuna jaro la
"Danubkurbiĝa E-Grupo" organizas nian
Renkontiĝon en la urbo Vác.

Mi povas vicigi tiujn organizojn kaj personojn,
kiuj estas niaj eksteraj protektantoj, kaj kiuj
helpas kaj apogas nian agadon per Esperanto
por Esperanto. Mi dankas al ĉiuj protektantoj la
helpon, apogon kaj kontribuon al nia laboro.

István Gulyás

IFEF KONGRESIS EN FRANCIO

La 65-a IFEF-kongreso okazis inter la 4-a kaj 11-a de majo 2013 en la belega departemento de Francio „Ĝirondio”. La ĉefurbo de tiu sudokcidenta regiono estas Bordeaux (Bordoza), kies ĉirkaŭaĵo troveblas nia kongresurbo Artigues-près-Bordeaux.

Jam sesan fojon gastigis la franca landa asocio de IFEF en Francio la fervojistan esperantistaron por kongresi. Post Paris en 1951, Avignon en 1969, Perpignan en 1988, La Mans en 1999 kaj denove Paris en 2007 sekvis en la vico Artigues-près-Bordeaux. Estis ege interesa, ke la francaj esperantistoj kunligis la IFEF-kongreson kun la kongreso de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto), kaj la du asocioj komune organizis la tutan programon de la unuigita kongreso. Pro tio la kulturaj programoj, ekskursoj eĉ la kunsidoj, prelegoj kaj aliaj kongresaj eventoj estis riĉaj kaj densaj. Entute 253 kongresanoj el 19 landoj partoprenis en la kongreso.

Pri Ĝirondio.

Pri Francio mi jam multfoje kaj multloke skribis iomete detale, pro tio mi prezentas nur la departementan Ĝirondio, kaj ties ĉefurbon Bordoza. Ĝirondio situas la sud-okcidenta parto de Francio, kiu estas unu el la kvin departementoj de la franca regiono Akvitanio. Ĝi etendiĝas sur 10.000 km²-oj, kaj enhavas preskaŭ 1,3 milionojn da enloĝantoj. En Ĝirondio estas naskita granda riverego de la kunfludo de la riveroj Garonne kaj Dordogne, kies nomo estas Ĝirondio, kies longeco estas 75 km-jn kaj larĝeco estas 12 km-jn je sia maksimumo. La estuaro entenas multajn insulojn, ĉu loĝatajn, ĉu sovaĝajn, kaj ĝi estas mirinda natura medio, kiu ŝirmas multegajn speciojn de fiŝoj kaj birdoj. La departemento havas variajn pejzaĝojn. Tiuj estas aluviaj valoj de la du riveroj, kie troviĝas agrikulturoj, la arĝilaj aŭ kalkŝtonaj montetoj borde de la valoj kun vitejoj, kaj sabla ebenaĵo okcidente, grandparte kovrita de arbaro. Ĝirondio etendiĝas ĉe la Atlantika Maro, la nomo de la 125 km-jn longa sabla marbordo estas „Arĝenta marbordo”. Tie troveblas la duno „Pilat”, kiu estas 5 km-jn longa, kaj la plej alta en Eŭropo (107 metroj). Apartenas al la



departemento la „Arkaŝona Golfeto”, kiu estas mara banloko de Bordoza. Malantaŭ la golfeto kaj la dunoj estas pinarbego. En Ĝirondio etendiĝas pli ol 100.000 hektaroj la „bordoza vitolando”. Tiu ĉi montras unu el la tipoj de la plej signifaj vinberkulturaj pejzaĝoj kun siaj noblaj vinberspecoj nomataj „cabernet sauvignon”, „merlot”, „sémillon” ktp. Dum la tuttagaj kaj duontagaj ekskursoj la partoprenantoj povis sperti kaj vidi la belecon de tiu regiono, la senfinajn arbarojn kaj la zorgeme kultivitajn vinberĝardenojn, la malgrandajn vilaĝojn kaj vinkelojn, pompajn kastelojn ktp.



Antaŭ la inaŭguro

Pri Bordoza.

La esplorfosado en la urbocentra kvartalo malkovris spurojn de Galla vilaĝo, kio atestas, ke tie verŝajne loĝis homoj jam antaŭ pluraj jarmiloj. Multe pli nekontesteble certa estas ĉeesto de Gallo-Romia urbo nomata Burdigala. Pri ĝi postrestas skribitaj dokumentoj, el kiuj pluraj verkitaj de la loka poeto Ausone. Dum la Mezepoko la urbon protektis altaj kaj larĝaj remparoj, el kiuj postrestas nur tri monumentaj

enirpordoj. En la malnova kvartalo de la urbo multaj stratoj ĝis nun konservas sian mezepokan mallarĝan aspekton. Bordoza estis la ĉefurbo de vasta regiono, regata de la potenca Duko de Akvitanio. Meze de la 12-a jarcento lia filino fariĝis edzino de la franca reĝo, sed ŝi rapide ekŝiĝis kaj edziniĝis kun la angla reĝo, al kiu ŝi alportis, kiel doton, la tutan akvitanian dukejon, inkluzive de Bordoza. La urbo fariĝis posedaĵo de la angla regno dum 300 jaroj, ĝis la jaro 1453, kiam finiĝis la centjara milito. Dum la bordoza estis feliĉaj, ĉar la angla reĝo al ili konsentis favorajn vivregulojn, kaj ili multprofite komercis, ĉefe per vinovendado kun angloj. Post la reveno al franca regno ili ne plu profitis samajn avantaĝojn, pro tio ili plurfoje ribelis. Pro tio oni konstruis fortikaĵon, kion la



La kongresejo de la 65-a IFK

bordozaĵoj malkonstruis dum la revolucio en 1789. Daŭre dense aktivis la havena trafiko, svarmis la velŝipoj sur la rivero Garonne. Dum la 18-a jarcento bordozaĵoj komercistoj multege pliriĉiĝis, dank' al la nigra sklavokomercio. Riĉuloj konstruigis belajn domojn en novaj kvartaloj, oni renovigis malnovajn konstruaĵojn, starigis monumentojn, do elformiĝis la bordoza aspekto. En tiu jarcento konstruiĝis multaj hoteloj, la urbdomo, pli ol 5.000 konstruaĵoj en la 18-a jarcenta arkitekturo, plantejoj, imponaj kortoj

kaj la publika ĝardeno. Dum la 19-a jarcento la urbo daŭre plietendiĝis ĉefe pro la industria disvolviĝo, eĉ la ĉirkaŭaj urboj pli kaj pli ampleksiĝis per modernaj konstruoj.

La urbo Bordoza situas ĉe la limo de la pin-regiono „Landes”, kaj ĉe la rivero Garonne. La nombro de la loĝantaro estas pli ol 240.000, kaj kun la ĉirkaŭaj urboj – al kiuj apartenas nia kongresurbo Artigues-près-Bordeaux (mallonge Artigues) – ĝi havas preskaŭ unu milionon da loĝantoj. Bordoza estas la naŭa urbo de Francio laŭ la grandeco, eĉ la sesa universitata urbo en Francio, kie lernas ĉirkaŭ 80.000 studentoj en siaj universitatoj kaj altlernejoj. La urbo estas kvazaŭ ĉefurbo de vino, ja poŝare tiu regiono agadas 14.000 vin-produktantoj, kiuj produktas sur 117.000 vit-hektaroj 700 milionajn da boteloj kun prezo-sumo de 14,5 miliardoj da eŭroj. Bordoza ankaŭ estas industria urbo kun 28.000 salajruloj. Kvankam en la lastaj jaroj la loka industrio suferis, ĝi refoje fariĝis bonfarta per avangarda industrio kaj novaj teknologioj, interalie aeronautiko. Gravaj estas la petrol-kemiaj kaj farmaciaj industrioj, kaj ankaŭ la agronutraĵa industrio. La servosektoro estas la plej grava, interalie pro la koncentrado de servoj rilataj al entreprenoj. Ankaŭ estas grava la ŝipkonstrua entreprenaro kun granda marhaveno, kiu ĉijare akceptas 1.600 ŝipojn kun 9 milionojn da tunoj.

La turismo pli kaj pli kreskas, ĉiujare vizitas la urbon 2,5 milionojn da turistoj. Post Paris ĝi estas la dua urbo en Francio pro la plej multaj historiaj monumentoj. Ekde la jaro 2007 la havena kvartalo, la gotikstila katedralo Saint André, la baziliko Saint Michel kaj Saint Seurin troveblas en la Unesko-listo de mondaj heredaĵoj. La abateja preĝejo Sainte Croix, la preĝejo Saint Paul, kaj la Granda Teatro estas en la listo de naciaj historiaj monumentoj. Cele protekti la aspekton de la historiaj kvartaloj en la urbo, la tramlinio tie estas konstruita sen katenario kun elektro-provizo el la grundo.

Promenante en la urbo oni povas viziti kelkajn belajn lokojn, konstruaĵojn, placojn kaj parkojn. La esplanado de la „Quinconces” kun sia 43 metrojn alta kolono kaj belega skulptaĵgrupo estas la plej vasta en Eŭropo. La „Granda Teatro” – inaŭgurita en 1780 – estas 88 metrojn longa kaj 47 metrojn larĝa, kaj estas konsiderata kiel unu el la plej belaj teatroj en Francio. La ŝtonponto „Pont de Pierre” estis konstruita laŭ ordono de Napoleono inter 1810 kaj 1822, ĝi longas 486

metrojn kaj larĝas 19 metrojn, kaj dum 150 jaroj ĝis la jaro 1965 ĝi estis la ununura ponto en Bordojo. La placo de la „Bourse”, kiu troveblas borde de la rivero Garonne estis la unua breĉo en la mezepokaj remparoj. Tiu placo estas unu el la publikaj areoj, kiu pleje reprezentas la francan klasikan arkitekturon de la 18-a jarcento. Ekde la jaro 2006 inter ĝi kaj la rivero Garonne eblas admiri la plej grandan akvospegulon en la mondo. Multaj muzeoj troveblas en la urbo, kiel la Natura Historia Muzeo, la Akvitalia Muzeo pri historio, arkeologio kaj etnografio, la Belarta Muzeo k.a. Tiuj kiuj trajne alvenas en Bordojo al la stacidomo „Saint Jean” povas admiri pri la vitrotegmento super la enstacidomaj trakoj. Tiu vitrotegmento estas la plej granda en Eŭropo, kaj ĝi estas en la listo de la naciaj historiaj monumentoj.

La kongresurbo – Artigues-près-Bordeaux – estas en la ĉirkaŭaĵo oriente de Bordojo. El la bordoza ĉefstacidomo la kongresanoj devis iomete longe veturi per tramo kaj buso al la kongresejo, sed mem la konstruaĵo estis taŭga por kongresi, loĝi dum la kongresa semajno, kaj manĝi en la restoracio. En urbeto Artigues troveblas elegantajn loĝdomojn, vere belegan urbodomon, trankvilajn promenejojn, mallarĝajn riveretojn, lagetojn kaj ripozlokojn. La kongresanoj havis eblecon por promenadi en la urbeto, kaj ĝui la urbetajn etosojn.

Pri la kongreso.

Sabate posttagmeze komenciĝis la unua programero de la kongreso, la **Gazetara konferenco**. En la monatoj antaŭ la kongreso la prezidanto de „Esperanto Gironde” sendis komunikojn al 23 gazetaraj kontaktoj. Malmultaj respondoj venis, kaj dum la konferenco nur du ĵurnalistoj partoprenis, kiuj faris radio-intervjuojn kun la vicprezidantino kaj kasisto de IFEF.

Poste sekvis la **Kunsido de LKK kun la estraro de IFEF**. Ni traktis la ĉefajn kongresajn eventojn, organizajn problemojn, kelkajn programŝanĝojn kaj ĉefe la aranĝon de la inaŭguro.

Vespere okazis la **Interkona vespero** en la restoracio, kie la ĉeestantoj salutis unu la alian, kaj helpe de bongusta vino ili babiladis pri la okazintaj eventoj de post la pasinta IFEF-kongreso.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis la **Solena inaŭguro**, kiun ĉeestis pli ol 110 kongresanoj.

Sur la podio sidiĝis la estraranoj de IFEF, Claude Nourmont vicprezidantino de UEA, Bernard Sarlandie prezidanto de „Esperanto Gironde” kaj Jean-Marie Darmian vicprezidanto de la Departementa Konsilio. Salutis la kongreson Sylviane Lafargue prezidantino de la Loka Kongresa Komitato kaj ankaŭ vicprezidantino de IFEF. Poste parolis al la kongresanoj la vicprezidanto de la Departementa Konsilio, kiun sekvis Claude Nourmont nome de UEA kaj UFE. En sia parolado ŝi akcentis la gravecon de la fervojista movado, kaj la bonan agadon de la fervojistaj esperantistoj en la kadro de UEA. Ankaŭ salutis la kongreson Stefan MacGill nome de ILEI, kaj la prezidanto de „Esperanto Gironde”. Fine la salutvortojn de UIC (Internacia Fervojunio) – senditajn de Rosalinde Taucher – laŭtlegis la prezidantino de LKK.



La 43 metrojn alta kolono en Bordojo

Dum la mallonga paŭzo okazis komuna kanto de la himno Esperanto, la „Espero”, helpe de muzikisto „Famo”, Marica Brletic kaj Metodi Markov. Post la paŭzo entute 14 landaj reprezentantoj salutis la kongreson, inter ili István Sutka, kiu transdonis la bondezirojn de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Ankaŭ salutis nome de la Akademio de Esperanto,

Brian Moon el Luksemburgio, kaj ankaŭ Andrej Grigorjev el Siberio.

Poste sekvis la festparolo de la prezidantino de IFEF. Rodica Todor en sia parolado unue menciis la asocion UFE, jene: „*La kunorganizanta UFE, kies ĝermoj troviĝas en la komencoj de Esperanto, aldonis siajn plurjardekajn spertojn, ĉar tiu Esperanto-asocio fondiĝis en 1898 kiel tegmenta organizaĵo de francaj esperantistoj. De franca esperantistaro estas ligita la jaro 1905, kiel unu el la ĉefaj jaroj de la lingvo kaj ties komunumo. Okazis tiam en sukcesa kaj mirinda interkompreniĝo, la unua Universala Kongreso de Esperanto, kiun ĉeestis d-ro L.L.Zamenof.*” Poste la prezidantino trarigardis la plej gravajn agadojn de la franca fervojista Esperanto-movado. Inter alie ŝi diris: „*Ligita al la komencoj de la franca esperantista movado estas ankaŭ la nomo Armand Berlande, fervojisto, vivanta en Villeneuve St. Georges, kiu iniciatis la unuan paŝon, koncerne la kunlaboradon pere de Esperanto inter fervojistoj. La 20-an de marto 1909 en la revuo 'Esperanto' li instigis al kunligo kaj interŝanĝoj inter fervojistaj esperantistoj. Estas multaj nomoj de elstaraj francaj fervojistaj esperantistoj, kiuj skribis tiun historion. Inter eminentuloj ni ne forgesu s-on Pierre Robiolle, kiu estis dum jaroj prezidanto de FFEA, kaj nuntempe honora prezidanto de tiu asocio.*”

Antaŭ la malfermo de la kongreso la prezidantino alvokis tri meritplenajn homojn al la podio. Unue temis pri Jeannine Daguin, multjara aktivulino en FFEA, kiu interalie rolis kiel kasistino en la du lastaj IFEF-kongresoj en Francio. Poste ŝi alvokis la prezidanton de la asocio „Esperanto Gironde”, s-ron Bernard Sarlandie, kaj la plej konatan Esperanto-aktivulon en la bordoza regiono s-ron Marcelo Redoulez. Ĉiuj tri ricevis IFEF-diplomon. Fine de sia festparolo Rodica Todor deklaris la kongreson malfermita.

Post la inaŭguro okazis **Komuna fotado** en sunbrila vetero. Poste sekvis aperitivo por ĉiuj ĉeestantoj sur verda herbtapiŝo antaŭ la restoracio, en kiu kadro ni povis gustumi delikatan dolĉan vinon, sukcon kaj diverspecajn sandviĉojn. Estis bona ideo de la LKK.

Posttagmeze pr. 70 kongresanoj spektis du filmojn pri Esperanto, kaj okazis la unua **Kunveno de la Faka Komisiono**. La ĉefa kaj plej grava temo estis serĉo de nova kunlaboranto por la terminara sekcio. Poste

prezentiĝis **Fervojaj novaĵoj** flanke de Danio (Jan Niemann) kun la titolo: „La trajnfonduso – Togfondens DK – 2013-2025”, de Kroatio (Zlatko Hinst) pri la temo: „Prezroj de la pasaĝera transporto”, kaj de Ĉeĥio (Ladislav Kovar) kun la titolo: „Alikonstruo de stacio Usti nad Orlici”.

Fine de la posttagmezo okazis gaskonaj dancoj kun la muzikgrupo **Maragane**. Multaj kongresanoj partoprenis eĉ dancis en gaja etoso. Poste okazis **Okcitana vespero**, en kies kadro Marcelo Redoulez faris ege interesan prezentadon per riĉa diaporamado pri la bordoza maskeronoj. Pli ol trimil figuroj ĉizitaj de saĝaj aŭ humuraj artistoj elmontris la altrangojn de la posedantoj de la diversaj konstruaĵoj. Estis prezentitaj ornamoj, kiujn ornamas maskeronoj pri karnavalaj maskoj, virinaj vizaĝoj, anĝelaj figuroj, kapoj de fabelaj kaj sovaĝaj bestoj ktp.



La estraro de IFEF dum la komitatkunsido

Lunde okazis la **Nepublika Komitatkunsido**. Partoprenis ĉiuj invititaj komitatanoj kaj observantoj. La komitato diskutis la kongresproponojn, kasraporton kaj bilancon, kaj la plej grava diskutemo estis la estonto de IFEF, kaj pri tio estis decidite krei provizoran komisionon, kiu konsistis el 12 personoj. Ĝi eklaboris jam en la sama tago vespere ĝis noktomezo. Alia grava temo estis la akcepto de nova landa asocio KEFS (Kuba Esperanto Fervojista Sekcio) el Kuba Esperanto-Asocio.

Posttagmeze okazis **Duontagaj ekskursoj** al Sankta Emiljono kaj al Bordoza. La tria ekskurso kondukis 35 teknikistojn al la tramgaraĝo de Bordoza. Dum la vizito ni rigardis la riparejon de la tramoj, la purigad-aparatojn, eĉ la Centrigitan Komandejon. La plej interesa estis la prezento de la elektra provizado de la tramoj en Bordoza. Tiu elektra

provizado el la grundo estas monda novaĵo. La nomo de la elgrunda sistemo estas „APS”. La tutan tramgaraĝon prezentis al ni specialisto kaj fakulo.

Vespere komencis *Lirikaĵoj*, en kies kadro okazis kantado kaj profesinivela spektaklo speciale kreitan por la fervojista kongreso, invitante al kunvojaĝo en fantazia trajneto. La kongresanoj ege ĝuis tiun prezentadon, kaj la aplaŭdoj estis forta kaj longa.

Marde okazis la *Tuttagaj ekskursoj*. La unua grupo vizitis la subĉielan muzeon de Marquéze, kiu estas rekonstruita al tipa loka vilaĝo. La dua grupo – kiun mi partoprenis – per speciala aŭtobuso vizitis la Arkaŝonan Golfeton. Unue ni alvenis al la dunpinto Pilat. Al la pinto ni povis iri per 150 ŝtupoj. De sur la pinto ni vidis tri malsimilajn mondojn kaj kolorojn, kiel la verdaj senfinaj arbaroj, la flava dezerto, kaj la blua maro. La plej alta pinto de la duno estas 107 metra, sed la duno estas vivanta, ĉar pro efiko de vento ĉiujare ĝi retroiras je 1 ĝis 4 metroj superkovrante la



Ekskursantoj sur la pinto de duno

arbaron ĉe sia orienta flanko. De la fino de la 19-a ĝis la 20-a jarcento ĝia alto kreskis je 80 metroj ĝis 117 metroj. Interesa kaj unika vidindaĵo! Poste ni vizitis la urbon Arkaŝono, kie ni promenadis sur la promenejo apud la maro. Post la abunda kaj bongusta tagmanĝo ni faris unuhoran ŝipadon sur la golfeto, kaj ni vidis la Birdan Insulon kaj ties surfostajn kabanojn, sennombrajn ostrobredejojn, plezurŝipajn havenojn kaj ankradejojn ktp. Tiu ekskurso vere estis interesa kaj neforgesebla.

Merkrede matene okazis la *Plenkunsido de IFEF* kun 55 ĉeestantoj. Unue la ĉefkomitatano legis la salutmesaĝojn. Salutis la kongreson d-ro Probal Dasgupta (prezidanto de UEA) el Hinda Unio, Herbert Mayer (direktoro de la Esperanto Muzeo) el Aŭstrio,

Han Zuwu (prezidanto de ĈFEA) el Ĉinio, Moritaka Osioka (prezidanto de JELF) el Japanio, Peter Zilvar kaj Zsófia Kóródy (flanke de ICH) el Germanio, Elda Doerfler (sekretario de TEA) el Italio, János Patay (Hm de IFEF) el Hungario, Martin Stuppnig (Hm de IFEF) el Aŭstrio, Berndhard Schwaiger (flanke de Radio FREI) el Germanio, Serio Boschin (membro de IFEA) el Italio kaj Hubert Peyrouy (membro de FFEA) el Francio. Krom la kutimaj ĉiujaraj pritraktitaj punktoj (estraranaj raportoj, raportoj de la Faka Komisiono, kaj la komisiitoj, resumaj jarraportoj, buĝeto, analizo de la nuna situacio en kelkaj landoj, rilatoj al aliaj organizoj ktp), ĉijare okazis estrarelekto por la oficperiodo 2013-2016. La rezulto estis, ke ĉiuj ĝisnunaj estraranoj estis reelektitaj. Ankaŭ estis akceptita aliĝo de nova landa asocio: Kuba Esperanto Fervojista Sekcio el Kuba Esperanto-Asocio, kaj estis konfirmita la invito al la 66-a IFEF-kongreso okazonta de la 17-a ĝis la 24-a de majo 2014 en San Benedetto del Tronto, Italio.

Posttagmeze la unua programero estis la *Prezento de la venonta kongreso*. Vito Tornillo kaj Romano Bolognesi per belega filmo pri la kongresurbo San Benedetto kaj la ĉirkaŭaĵo prezentis la vidindaĵojn, kongresejon, ekskurslokojn, loĝ- kaj manĝeblecojn k.a. Ili detale konigis la kongresan programon kaj la prezojn. Poste ili transdonis al ĉiuj landaj asocioj la informilon kaj aliĝilon.

Poste okazis la ĉiam atendente programero la *Movadaj aferoj*. Partoprenis ĉ. 25 personoj. Temas pri nefaka kunsido, dum kiu la ĉeestantoj libere diskutas pri reklamado kaj varbado al Esperanto, kaj pri aliaj temoj. El inter la alparoloj kelkaj interesaj ideoj venis: starigo de Esperanto-kursoj en kulturdomoj por fervojistoj ĉefe en Siberio; interrete



plimulti la kontaktojn inter IFEF-anoj; nuntempaj homoj – ĉefe la gejunuloj – ne plu kunvenas en la kluboj, ili estas ĉe la komputiloj, kaj interrete lernas la lingvon Esperanto; devus haltigi la malkreskon de la membro-nombro en kelkaj landoj.

Okazis **Prelego** fare de Stefan MacGill kun la titolo „Rolo de la fervojo en moderna mondo”. En tiu prelego la preleganto prezentis la hungaran fervojreton, la rapidecon, kaj komparis tion kun eksterlandaj retoj.

Vespere okazis **Bankedo kaj balo**. Ni bone kaj abunde manĝis en la bankedo, kaj ni gratulis al la kuiristoj kaj la restoracia servo. La muziko estis agrabla dum la bankedo kaj la balo, kaj la ĉeestantoj bone amuziĝis preskaŭ ĝis la noktomezo.

Ĵaŭde antaŭtagmeze okazis la **Ĉefa fakprelego** pri „La bordoza tramo kaj ties moderna APS-sistemo”. Pli ol 70 personoj partoprenis tiun. La geedzoj Lafosse kune stiris la aferon, kaj la tre interesa temo kaptis la atenton de ĉiuj. Tuj poste okazis la **Prelego** pri la „Fervoja viadukto de Fades”. Robert Combes helpe de diaporamo prezentis la etapojn de la konstrulaboro de la viadukto, kiu havas pli ol 100 jarojn, do estis pli historia ol moderna temo. Posttagmeze okazis ankoraŭ du **Prelegoj**. La unua estis pri „Japanaj trajnoj”, fare de Mireille Grosjean. La temo estis por mi ege interesa, ja mi estis en Japanio dum la Universala Kongreso de Esperanto, kaj mi spertis tiujn interesaĵojn, pri kiuj ŝi per bildoj prelegis. La alian prelegon faris Andrej Grigorjev kun la titolo: „Siberia Fervojista Sindikato”. La temo estis ege interesa, ĉar la aŭskultantoj malmulte aŭdis pri Siberio, kaj tieajcirkonstancoj.



Frua vespere okazis **Ekumena diservo** en la romanika preĝejo en Artigues. Tri pastroj celebris la esperantlingvan diservon, kiun pr. 30 kongresanoj partoprenis.

Vespere okazis **Prezento pri la centa UK** okazonta en franca urbo Lille en 2015. Jam nun komenciĝis la preparlaboro pri tiu grava evento. Poste la dupersona **Muzikgrupo Kajto** donis koncerton. Ili en Esperanto faris spektaklon plenaj je humuraj, emociaj kaj ekologiaj aŭ socikritikaj kantadoj, ritmigo per manfrapoj kaj foje eĉ kundancado.

Vendrede antaŭtagmeze okazis **Duontaga ekskurso** al la citadelo de Blajo. La citadelo estas unu el la plej belaj konstruaĵoj de la milita arkitekturo de la 17-a jarcento. La vizito memorigis interesplenajn eventojn historiajn, kaj ebligis ĝui admirindajn panoramojn al la ĉirkaŭa blaja kamparo, al la urbo kaj al la vasta estuaro Ĝironde, kaj ties insulo-vico. Tio pravigas la latinan devizon de la urbo Blajo „Stela akvitalia ŝlosilo”.

Posttagmeze okazis la **Fermo de la kongreso**. Sylviane Lafargue malfermis la lastan oficialan kongresan eventon. Rodica Todor iomete detale taksis la kongresajn okazaĵojn. Ŝi esprimis sian kontenton pri la aranĝo, kaj laŭdis la LKK-anojn kaj la helpantojn, kiuj kontentige prizorgis ĉion. Ŝi aparte menciis la sukceson de la komune organizita kongreso, kiu havis grandajn avantaĝojn ĉefe pro la riĉaj kulturaj programoj, pro la multaj altkvalitaj prelegoj, eĉ pro la internacia etoso. La prezidantino akcentis la sukceson de la Kongresa Bulteno, el kiuj aperis tri numeroj ilustritaj per fotoj de la kongresaj eventoj. Post la adiaŭparolo la LKK-prezidantino vokis al la podio la LKK-anojn kaj la helpantojn, kiuj ricevis grandan aplaŭdon. Eĉ la vicprezidantino de UEA Claude Nourmont aparte vokis al la podio sinon Renée Triolle, kaj transdonis al ŝi UEA-distingon pro la multjara, efika kaj entuziasma agado en Esperantujo. Fine la kongresan flagon transprenis Vito Tornillo LKK prezidanto de la 66-a IFEF-kongreso.

Post la fermo okazis interesa **Kultura programo**, kiam la internacia koruso „Interkant” montris sian novan spektaklon „Pri Karmen”.

Vespere okazis la **Adiaŭa vespero**. Estis ege interesa, ke mem la kongresanoj prezentis kantojn, skribaĵojn kaj muzikojn. Kelkaj el ili estis vere altnivelaj, eĉ profesiaj. Do estis inda fermo de la kongreso.

Ĝis revido en la venonta majo en San Benedetto del Tronto, en la 66-a IFEF-kongreso!

István Gulyás

13+1 DEMANDOJ

Mi denove sukcesis intervjui elstaran, entuziasman kaj eminentan fervojistan esperantiston en la kadro de la intervju-serio laŭ la supra titolo. D-ro Romano Bolognesi honora prezidanto de IFEF akceptis mian inviton, kaj respondis al miaj demandoj, jene:

1./ Kiel kaj kiam vi ekkonis Esperanton?

Mi vivis en mia naskiĝurbo Bologna, kaj en mia dekses-jara aĝo en ĵurnalo mi legis pri anonco de la lingvo Esperanto. La ideo de la Internacia Lingvo ekplaĉis al mi, ja mi ne estis kontenta pri la mezlerneja instruado de la franca lingvo. Pro tio mi tuj eklernis la Lingvon Esperanto kaj mi frekventis la lokan movadon; sed dum la sekvaj junulaj jaroj mi ne povis plene utiligi ĝin pro la tro intensa supera kaj universitata studadoj. En tiuj studoj mi lernis ankaŭ la anglan lingvon. Malgraŭ tiuj ĉiam mi restis ligita al la ideo, kvankam iom supraĝe. Krome mi memoras pri tiu mia ĉagreno, ke mi ne havis sufiĉan monon por veturi eksterlanden, por ke mi ekzercu min en la lingvoscio kaj mi akiru internaciajn lingvajn spertojn.

2./ Mi scias, ke vi havis gravan profesion laboron ĉe la Italaj Fervojoj, kiu utiligis vian tempon kaj energion. Tamen vi agadis en Esperanto. Kie kaj kiel vi komencis agadi sur la tereno de Esperanto?

Kiel junulo, kun vivtenadaj necesoj mi estis tre interesata ek trovi kontentigan profesion postenon. Komence tio okazis ekstere, kaj poste ĉe la Italaj Fervojoj. en kiuj per konkursaj ŝtupoj ĉiam mi klopodis plialtigi miajn fakajn konojn kaj laŭeble alproprigi diversajn taskojn. Komence mi estis dungita en granda vagonriparejo,

poste mi deĵoris kiel teknika vagoninspektisto en grandega rangostacio, pli poste kiel trajntrafikestro en laŭlinia stacio. Fine dum la plej longa deĵortempo mi agis kiel sekretario en la oficejo



D-ro Romano Bolognesi

de la Generaldirektoro de la Bologna-Distrikto.

Post la unuaj privatigaj reorganizadoj de la fervoja administracio sinsekve mi ricevis la taskon organizi novan prijuran fakon, estri la Logistikan Sekcion de la Distrikta Direkcio, kaj fine la ĉefan Personaran Administran Unuon de la Bologna-Nodo.

En 1983 la tiama prezidento de Italio, Sandro Pertini distingis min per la Ordeno „Kavaliro de la Itala Respubliko”.

Mi fieras pri mia faka kariero, paralele mi ne forgesis Esperanton. Ekde la fruaj sepdekaj jaroj mi ne preterlasis la bonan ideon de la Esperanto ĝis kiam iom post iom pli intense mi ne penetris al la movada laboro, al la ĝenerala kaj faka agadoj. De tiam mi sukcesis informi, veki interesigon al diversaj kolegoj pri la Lingvo; preskaŭ ĉiuj miaj kolegoj konis min pri tio, kaj ankoraŭ nun multaj memoras mian agadon rilate al Esperanto.

3.) Dum multaj jaroj Vi estis sekretario kaj prezidanto de IFEF. Dum via tiurilata agado kiujn gravajn rezultojn akiris IFEF?

Nature, fake mi ekagadis ene de IFEA (Itala Fervojistia Esperanto-Asocio) helpante al Germano Gimelli, en 1984 mi fariĝis sekretario de IFAE, en tiu funkcio mi agadis ĝis la komenco de la jaro 2013, kiam oni elektis mi prezidanto de tiu.

En 1989 la IFEF-Kongreso elektis min sekretario de IFEF, sed jam pli frue mi partoprenis en la federacia laboro, precipe kiel membro de la Statuta Komisiono – kune kun Joachim Giessner kaj Henning Hauge – tiun IFEF-Statuton aprobis la 41-a IFEF-Kongreso en Salou (ES). Tiu Statuto eĉ nun validas kaj bone efikas. En 1998 mi fariĝis IFEF-prezidanto kaj funkciis ĝis la jaro 2010, kiam mi decidis forlasi por favori je la renovigo de la estraro. Dum mia 21-jara estrara periodo IFEF akiris multajn pozitivajn rezultojn, ĉefe kiel rekonon de la senlaca faka terminologia pristudado ĉe UIC (Monda Fervoj-Unio).

Intertempe ni kaj iuj landaj asocioj aliĝis kaj ekagadis, sed bedaŭrinde iuj aliaj ne povis resti aktivaj. Ne laste persone mi fieras, ke dum tiom da jaroj mi ĉiam klopodis kontribui por mildigi kaj glatigi eventualajn malakordojn kaj kontrastojn (bonŝance vere malmultajn) kaj favorigi efektivan kunlaboron. Neniu sukcesas sole atingi bonajn rezultojn. Feliĉe, en la Federacio mi trovis varman amikecan etoson kaj vere altkvalitan kunlaboradon.

4.) Kion vi opinias pri la fervojista Esperanto-movado, pri la agado de la italaj kaj hungaraj fervojistaj esperantistoj?

Mi opinias, ke ĉiuj esperantistaj fervojistoj preskaŭ heroece daŭrigas pasie kaj persiste labori, malgraŭ, ke ĉiuj privatigoj, dispecigoj de la fervojaj landaj retoj kaj servoj, la ne oftaj dungoj de junaj laboristoj (plejofte per necertaj, nur portempaj kontraktoj) tre draste malaltigis la nombron de la fervojistaro, kaj preskaŭ nuligis la emojn al la tipaj internaciaj

kontaktoj de la esperantistoj sub la premoj de la fortaj ĉiutagaj malfacilaĵoj, eĉ ĉantaĝoj. Ne nur italoj kaj hungaroj travivas similajn malfavorajn situaciojn, ĉar temas pri ĝenerala situacio, almenaŭ tuteŭropa. Ĉu ni rajtas esperi inverson de tiuj savan reorganizadon? Kelkloke historiaj ekzemploj montras revenojn. Se tio okazos, eble tio estos ne nacie, sed je



La IFEF-estraro en Sopron 2004: L. Vignaud, M. Brletic, R. Bolognesi, I. Gulyas, J. Ripoché

kontinenta nivelo, kiel antaŭ cent jaroj simile oni vidis naciigojn de fervojoj. Se tio ne estas nur revo, tamen la venonta generacio travivos ĝin.

5./ Ĉu eblas plivastigi kaj larĝigi la uzadon de la lingvo Esperanto sur la fakaj terenoj?

Estas fakto, ke Esperanto evoluas laŭ tute normalaj vojoj kiel ĉiu alia lingvo. La uzantoj devas adapti ĝin al la kreskantaj postuloj de la diversaj fakoj. Elstaras en tiu agado la bone kunligitaj kuracistoj, verkistoj, fervojistoj, sciencistoj, muzikistoj kaj multaj aliaj, kiuj eldonas revuojn, organizas konferencojn kaj helpas disvastigi la lingvon por profesia kaj faka uzo. La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), faciligas la kunlaboron sur la universitata nivelo. Originalaj kaj tradukitaj verkoj aperas pri astronomio, informadiko,

botaniko, kemio, juro, filozofio ktp. Statistike konstateblas, ke Esperanto ĝis nun atingis lokon inter la unuaj 50 lingvoj

de la mondo laŭ la ofteco de uzado en la internacia komunikado. En *Vikipedio* (la plej famkonata libera reta enciklopedio) inter 285 lingvoj ĝi okupas lokon 32 laŭ la nombro de artikoloj (ĉ 180.000 paĝoj) kaj lokon 40 laŭ la paĝovizitado (ĉ 390.000). Vikipedia taksas

Esperanton tiel: ĝi estas parolata en ĉ. 120 landoj en la tuta mondo; denaskaj parolantoj estas kelkaj miloj; ĝi estas uzata kiel fremda/dua lingvo inter 100.000 kaj 2.000.000 homoj (depende de difino de la termino "Esperanto-parolanto"). *Google* (la plej vasta reta serĉmotoro) ofertas Esperanton kiel unu el 41 serĉlingvoj kaj ĝi estas unu el ĉ. 60 traduklingvoj de *Google-Tradukanto*. Kelkloke Esperanto havas pli favoran aŭ pli malfavoran pozicion: En la frazaro kun tradukoj *Tatoeba*, ĝi okupas la 2-an lokon post la angla (marto 2013) kun pli ol 223.000 frazoj./

6./ Vi estas tre aktiva en la redaktado de fakaj kaj ĝeneralaj tekstoj. Kiel vi taksas vian laboron kaj ĝenerale alies agadon pri tiu certe grava parto de la asocia vivo, kaj kion vi ŝatus vidi realigata prie?

IFEF eldonas propran organon „*Internacia Fervojisto*” kaj ankaŭ kelkaj aliaj landaj asocioj redaktas sian periodaĵon. Per tiuj eldonoj firmigas la ligojn inter la estraroj kaj iliaj disaj membroj, kiuj tiel estas informitaj pri la asocia vivo, ktp. En la redaktado de „*Itala Fervojisto*” mi postsekvis la paŝojn de Germano Gimelli, sed iom post iom mi klopodis altigi en ĝi kvantojn kaj kvalitojn. Krom bonnivelaj fakaj artikoloj (rememoru ke en 2009 eĉ eldoniĝis „*Jubilea fak-kolekto el Itala Fervojisto 2000-2009*”, 72-paĝa kroma speciala numero) mi enkondukis multajn diverstipajn temojn pri sciencoj, lingvoj, proverboj, aforismoj, kuriozaĵoj, poemoj, ŝercoj, vinjetoj kaj

ludoj, kiuj montras la perfektan flekseblecon de Esperanto. Laŭ la taksoj de diversaj legantoj (ĝia nuna disendo atingas ĉirkaŭ 450 adresojn) la enhavo, plej ofte varbadcele dulingva, estas riĉa kaj interesa.

Redakti kaj eldoni postulas multan laboron kaj bedaŭrinde nur kelkaj lokaj



D-ino R. Todor, J. Tomišek, la IFEF-estraro en Boulogne-s.-m. 2005

revuoj pluivas, kies la plej valora ekzemplo certe estas „*Hungara Fervojista Mondo*”, vere laŭdenda laboro same kiel tiu de „*Esperanto Fervojisto*” de FFEA, „*Dana Fervojisto*” de DEFA, „*Fervoja Esperantisto*” de GEFA kaj la lastnaskita „*Ĉina Fervojisto*” de ĈFEA. Bedaŭrinde nur sporade aperas organoj el Japanio, Bulgario, Polujo, Rumanio kaj aliaj. Bonŝance jam iĝis kutima la perreta kumunikilo „*El Fervoja Mondo*” prilaborita de nia senlaca Jindřich Tomišek, al kiu ni danku, kiel same al la redakcio de „*TeKu*” (*Terminara Kuriero*), kaj la *FervojFakaj Kajeroj*.

IFEF ne povus vivi sen siaj revuaj eldonaĵoj, kiuj ekaperis jam en la fruaj jaroj de la fervojista movado. La nuntempa laboro estas ege laŭdinda, ankaŭ konsidere, ke temas pri vere internacia kunagado. La febla flanko de afero estas, ke la kostoj por presado kaj sendado eluzas multan federacian monon. Mi bedaŭras, ke mia propono ne realiĝas, nome: centre presi nur etan kvanton, sendi retan version kaj lasi al landaj asocioj la reproduktan distribuan taskon, ĉefe pli kaj pli retan al

siaj membroj, kaj kiel eble al plej multaj eksteraj adresoj.

7./ Ĉu via edzino Elisa vere estas multflanka kunlaboranto por vi ankaŭ en la Esperanto-agado?

Mia edzino Elisa Gualandi eksciis pri Esperanto pere de mi kaj ŝi ne tuj povis senti sin same konvinkita kaj envolvita, sed akompanante min (komence eble kun ne tro da emo, sed poste kun ĉiam pli da entuziasmo), iom post iom, ĉiam pli interkomunikiĝante kaj konstatante la facilajn kaj agrablajn amikiĝojn, ŝi akiris pli ol ordinaran intereson partopreni en miaj proponoj.

Tio certe multe helpis min, neniam mankante pri konsiloj kaj eĉ kunlaborante kunorganizi la kongreson en Cervia 1993 ktp, kiel ĝuste povas okazi ĉe la samparolantaj kaj kunagantaj paroj, kiuj sin kuraĝigas reciproke.

Nuntempe ne nur rave ni rememoras pri la multegaj kunaj eksterlandaj vizitadoj, pri la multnombraj interesaj homoj, kiujn ni konis, sed ni eĉ pli daŭrigas deziri tiajn apartajn kontaktojn, kiujn nur Esperanto permesas kaj tiel multe „spicis” niajn vivojn.

Kiam kunul(in)o ne povas strikte sekvi la alian, tio iel estas bremsa, sed certe eĉ ĉiu hejma laboro por la familio oni devas taksu same favora kaj helpa, kvankam tio ne rekte evidentiĝas en la movada agado. Pri tio mi estas tre bonŝanca kaj danku al ŝi. Ja, ni neniam manku danki al niaj karaj partneroj, kiuj pacience eltenas niajn eble troajn dediĉojn al la kara „afero”, niajn forestojn, niajn flankenlasojn. Ili meritas multajn laŭdegojn.

8./ Kio estis via plej interesa travivaĵo en Esperanto?

Dum la jaroj mi travivis tre multajn interesajn spertojn. Elekti inter ili estas malfacile ĉar ĉiuj el ili donis al mi malsimilajn apartajn emociojn. Eble la plej elstara kaj kortuŝa okazis dum la vizito sur la „ĉina murego”, kadre de la UK en Pekino 1986, kie hazarde ni renkontis iujn

ĉinajn geknabetojn, ĉirkaŭ 6-10 jaraĝajn, tie ekskursantajn kun siaj instruistoj. Ili vidis niajn Esperanto-insignojn kaj tre respektoplene laŭvice alparolis nin en bonega Esperanto. Vere kortuŝa epizodo, kiu konfirmis certecon al nia estonto.

Aldone mi tre volonte rememoras pri du prelegvojaĝoj tra Francio, ĉefe tra Bretonio, dum kiuj estis nenombreblaj la interesaj interkonatiĝoj kaj la ricevitaj afablecoj. Same okazis dum diversaj staĝoj, kunvenoj kaj diverstipaj kongresoj: iuj de UEA, pli multaj de FEI, la itala



D-ro Romano Bolognesi dum prelego

federacio, de FFEA en Francio kaj super ĉio la ĝis nun 35 por mi sinsekvaj IFEF-Kongresoj. Ja, multaj aliaj epizodoj kaj spertoj estus nepre menciindaj.

9./ Kion vi opinias pri la ŝanĝo de la nuntempa agado de la IFEF-estraro?

De kiam mi komencis priagadi, mi travivis pli ol la duonon de la vivo de IFEF kaj tiel mi havis la okazon koni kaj observi la laboron de multaj elstaruloj de nia movado. Tiam la membro-nombro estis sendube laŭnombre pli alta, dum mala estis ilia/nia aĝo. Multegaj kolegoj estis ankoraŭ aktivaj fervojistoj kaj povis ĝui pri pli favoraj kondiĉoj por fervojaj veturadoj kaj ricevoj de libertempo. La nunaj estraranoj duone estas pensiuloj kaj plej ofte estas pli falkvoste flugveturi al estrarkunvenoj kaj al kongresoj ol uzi trajnojn. La nunaj komunikaj teknologioj permesas pli rapidajn kontaktojn, eble signifaj ŝanĝoj en la agado apenaŭ okazis. Multe pli gravas, ke tute ne malkreskis en la estraro la entuziasmo kaj la kunlaboro por nia afero.

Ĝis kiam tio restos, la pluvivo de IFEF ne estos minacata.

10./ Kiuj estas la plej gravaj taskoj de la faka agado? Ĉu vi povus menciĝi ekzemplojn por doni modelon al la fervojistaj esperantistoj por la utiligo de Esperanto en la praktiko?

Laŭ mi, oni devas rememori la taskojn de norm-ideala esperantisto: t.e. la uzadon kaj la disvastigadon de la lingvo. Kaj unue, sen lingva instruado nenio alia povas sekvi kaj mi iel heredis la instruadon en mia urbo, ekde frua tempo ĉefe ĉiam regata de kleraj fervojistoj aŭ familianoj, ĉiuj IFEA-membroj: inĝ. Otello Nanni, prof-ino Wanda Sabelli, kav. Giuseppe Zacconi, inĝ. Gianluigi Gimelli kaj mi mem ekde 1987. Mi superis la unuajn du lingvajn ŝtupojn de la Itala Instituto de Esperanto en 1958 kaj la trian pri instrukapablo en 1986, ekde kiam mi regis la Bologna-Katedron de la Itala E-Instituto. Laste, en 2011, mi akiris la Atestilon pri lingva ekzameno de ELTE, laŭ KER (= Komuna Eŭropa Referenckadro), nivelo Supera (C1), tipo Kompleksa.

Ekde 1987 ĉe Dopolavoro Ferroviario mi mem organizis kaj gvidis ne malpli ol 45 kursojn laŭnecese eĉ je tri niveloj; mi starigis multajn ekzamensesion en Bologna kaj en aliaj regionaj urboj. Entute la Katedro ekzamenis pli ol 200 kandidatojn (1-a grado 140, 2-a 50, 3-a 17).

Kompreneblas, ke tiu porinstrua aktivado kaj diverstipaj aliaj studoj multe okupis mian tempon. Tiel ne tro eblis mia dediĉo por la faka agado, ekzemple en la terminologia tereno kaj en la fakaplika esplorado kaj verkado de fervojaj prelegoj. Mi iel, tiel parte senkulpigas min, ĉar iuj aliaj italaj samideanoj kiel Germano Gimelli, Serio Boschin kaj Vito Tornillo daŭre kunlaboris en la Faka Komisiono.

Laŭ mia opinio estus bezonata altnivele alproprigi la faklingvon, kaj paralele la evoluo de tekniko devus evoluigi la fakajn

vortrezorojn. Tiu tasko estas unu el la plej gravaj aktivecoj por la estonto de la fervojista Esperanto-movado.



Kongresanoj en Poznan 2008

11./ Mi partoprenis en kelkaj estrarkunsidoj en la belega itala urbo Bologna. Vi ĉiam organizis urbovizitadon, kaj ĉiun fojon vi povis prezenti al ni novajn kaj pli novajn urbopartojn, konstruaĵojn, postrestaĵojn k.a. de Bologna. Vi precize, interese, eĉ profesie kaj entuziasme povis paroli pri tiuj, eĉ al ĉiuj demandoj vi ankaŭ povis detale respondi. Ni diris unu al la aliaj, ke Romano estas vivanta leksikono. Kiamaniere vi akiris tiun larĝskalan scion pri la urbo, eĉ pri tuta Italio?

Mi naskiĝis en Bologna kaj dekomence mi scivolis koni kio ĉirkaŭas min, kaj rigardi la aferojn kiel ili estus mia hejmo mem, en kiu mi rekonas multajn objektojn. Sed, iom ŝerce, tamen tute ne, kredis, ke la nekonataĵoj estas multe pli ol tiuj, pri kiuj mi povas diri kelkajn vortojn.

Iel, eble mi naskiĝis kun scivolemo pri multaj aferoj: geografiaj, historiaj, arkitekturaj, artaj, sciencaj, sociaj, moraj, lingvaj, ktp, kiel vi konstatas, sed bonŝance aldone mi ricevis stimulojn kaj instigojn. Konsekvence miaj elektitaj universitataj studoj ne hazarde rilatis al la homa kunvivado, kaj mi doktoriĝis pri sociologio kun enprofundiĝoj pri juro, antropologio, etnologio, psikologio, lingvistiko, komunikado, ekonomio, statistiko, k.a.

Tiuj studoj donis al mi tre larĝan vidrigardon, kiuj eĉ stimulis min ne plu rezigni daŭre kleriĝi.

Kiel membro de esplora grupo pri la Bologna-historio kadre de kultura asocio, kiu zorgas pri la konservado de historia, arta teatr(et)o, kiun en 2008 mi havis la okazon vizitigi al la IFEF-estraro, jam de 20 jaroj mi kaj ankaŭ mia edzino kontribuas per eseoj pri lokaj, sed



La IFEF-estraro Paris 2007

internacie famaj personoj (kiel Guglielmo Marconi), institutoj (kiel la Nacia Universitata Biblioteko), monumentoj kaj artaĵoj (iuj nobelulaj palacoj, preĝejoj, ktp.), sciencobjektoj (kiel la meridiana linio de Gian Domenico Cassini (kiun mi prezentis ankaŭ prelege en Esperanto).

La lernado de la internacia lingvo eĉ plivastigis miajn horizontojn, kaj ankaŭ danke al miaj vojaĝoj kaj konoj, mi povis kompari kaj perfektigi multajn sciojn.

Cetere, ĉar mi ne ŝatas vane klaĉi pri niaj konatuloj, prefere mi legas instruajn tekstojn, traktas kaj konversacias gaje kaj bonhumore kun malfermensaj homoj, kiuj povas levi mian spiriton kaj helpi mian komprenon. Se okazas, ke tiu mia karaktera flanko enuigas iun, mi certe bedaŭras, sed mi tion emas kaj elektas.

12./ Via alia „hobio” estas studi la diversajn lingvojn, ideogramojn, literojn, interpunkciulojn, skribmanierojn. Mi jam plurfoje aŭdis prelegon de vi pri tiu ege interesa temo. Kiamaniere vi havas tempon por tiu „hobio”?

Ja, temas pri flanka okupo ne rekte profesia iel venanta de Esperanto, sed perfekte konsekvenca kun miaj diritaj studoj kaj interesoj.

Mi permesas al mi kritikan konstaton pri tiuj samideanoj, kiuj utiligas la internacian medion ne multe pli kiel turismilo, aŭ pri kiuj, kvankam sinceraj movadanoj, tro supraĵe ne celas pli multe „fakiĝi” pri Esperanto kaj ĝenerale pri la komunika fenomeno. Mi multe interesiĝis pri tio, konkludante, ke ne sufiĉas entuziasme prezenti nian lingvon nur kiel facilaĵo, ktp, sed ĉiam necesas montri profundajn konvinkigajn konojn pri la diversaj flankoj de la vasta lingva panoramo kaj problemoj.

Fakte, mi kolektis multajn materialojn pri la lingvoj en la mondo, unue klopodante kompreni „kiel” la evoluiĝinta homa specio komencis uzadi tiun apartan komunikan rimedon, vere tipa je ĝi, kiel estas la parolkapablo. Sed ne nur „kiel” estas interesa, ankaŭ „kia homo”, „kie”, „kial”, „kiam” bezonas respondon. Same mi esploris pri la eltrovo de la skribo, al kiu aplikiĝas similaj demandoj. Tiu diverstipa materialo iĝis konsista kaj tio instigis min proponi prelegojn por doni priajn informojn kiel eble al plej multaj homoj, ĉar ĉiuj, per heredo, uzas la rimedon „parolon”, sed malmultaj scias, eĉ ne konscias, pri tio.

Lige al tiuj du diritaj rimedoj: la voĉaj kaj la skribaj aplikoj, mi taksis grave trakti ilin statistike kaj esplori etimologiojn (t.e. la devenojn de la vortoj kaj de la signifoj), la sintenojn kaj politikojn al/kontraŭ la lingvoj, kaj krome nelaste la diverstipajn lingvoinventojn, kies produkto estas ankaŭ Esperanto.

De tie estis facile kompreni, ke eĉ la plej simpla homa socia organizo ne povas strukturiĝi sen komunaj 1) lingva komunikilo, 2) teoria kaj ekonomia kalkulasistemo kaj 3) tempa mezurado, t.e. mallonge sen ia socia administrado.

Mi ofte prezentis tiajn temojn per kursoj ĉe liberaj klerigaj Universitatoj kaj per

prelegoj en Italio kaj eksterlande, ankaŭ en Esperanto, ĉar pri tio mi multon tradukis.



Romano kaj Elisa en Bretonio 2009

13./ IFEF havas libretojn pri la historio de la fervojista Esperanto-movado inter 1909 kaj 1999. Oni proponis al vi daŭrigi tiun historion. Ĉu vi havas eblecon (materialojn de la landaj asocioj, konojn pri la interrilatojn kun UEA, FISAIC kaj aliaj Esperanto-organizoj ktp) daŭrigi tiun laboron?

La unua pria manuskripto estis verko de la historiisto d-ro Marek Wajsblum (Krakovo 1903 - Londono 19/02/1962) prilaborita kaj eldonita de la IFEF-estraro en 1968. Dua riĉa broŝuro aperis, kiel ties prilaborita resumo kaj kompletigo (1909-1984) okaze de la 75-a jubileo de la IFEF. Tria estis eldonita en 1999, kiel kroma kompletigo por la 90-jara datreveno. Ambaŭ lastaj estis zorgaj verkoj de Joachim Giessner.

Fakte, post insisto mi konsentis akcepti tiun gravan taskon cele al digna solenado de la IFEF-centjariĝo, kvankam iel iom time, ĉar verdire mi sciis, ke ne estas historia fakulo, kaj ĝuste tiam jam ekis la preparoj por la antaŭvidata IFK en Italio (Triesto, 2009), kiuj dum monatoj eltiris min for de la normala vivoritmo. Meze de tiu laboriga periodo mi serioze estis atakita de ege grava kaj timiga malsano, kontraŭ

kies malbonaĵoj mi forte devis/volis reagi. Mi ricevis operacion. Ĝis nun, ŝajne, la sekvoj estas kontentigaj, sed certe mia sanstato estas ĉiam sub kontrolo kaj evidente vere pli febla. Post la maltrafita rendevuo kun la centjariĝo eble mi ne tiel multe sentis urĝon, sed ankoraŭ mi esperis kaj ne decidis malkonfesi la taskon mem, ĉiam daŭrigante iel kolekti primovadajn informojn. Mi, laŭeble, deziras kaj klopodos sukcese plenumi tion.

13+1/ Vi estas „Honora Premzidanto” de IFEF. Tiun distingon vi ricevis dum la jubilea kongreso de IFEF en Triesto en la jaro 2009, kiam ni festis la centjariĝon de la fervojista Esperanto-movado. Kiel vi taksas tiun distingon? Kiuj estas viaj planoj por la estonta agado por Esperanto? Kiel vi vidas la estonton de Esperanto?

Kiel mi diris antaŭe, post multjara agado en la kadro de la IFEF-estraro, ne senpripense, mi atente taksis miajn atakitajn fortojn kaj kapablojn, agnoskante ke estus bone iom limigi, malpliigi la agadojn je tiu nivelo, pro natura fluo kaj ankaŭ por eklasi al pli junaj homoj (ĉefe se ankoraŭ profesie aktivaj) evoluigi iliajn kapablojn laŭ pli aktualaj vojoj kaj kondiĉoj.



Kun inĝ. Gulyás dum vizito de regadejo en Poznan 2008

Ricevinte la distingon Honora-Prezidanton mi multe ĝojis kaj ĉiam mi tenos ĝin en mia koro, pensante, ke oni povis rimarki bonon en mia longdaŭra agado, en kiu laŭ miaj ebloj mi enmetis konojn, spertojn, sed ankaŭ grandan pasion kune kun homeca ekvilibro.

Mia ĉeesto en la vicoj de la movado restos ĝis kiam mi povos esti utila kaj kapabla doni kaj ricevi atestojn de reciproka amikeco kaj de lingva kaj homa plikresko.

Pri la estonto de nia Lingvo, kies evoluo estas certa, kvankam alternanta laŭ la tempoj kaj la lokoj sub la influoj de la



La IFEF-estraro en Arnoldstein 2009

ŝanĝiĝantaj internaciaj instituciaj kaj lingvaj politikoj, dumtempaj modoj kaj etikaj, moralaj celoj, ktp, estas sendube, ke la homaro nepre bezonas faciligitan internacian komunikilon, kiel estas Esperanto.

Tio, eĉ des pli dum la disvastiĝo de la nuna ĉiam kreskanta tutmondigita telekomunika retejo, en kiu jam ekzistas multaj eblecoj libere atingi senkostajn lernilojn, tradukilojn, vortarojn kaj enciklopediojn, literaturaĵojn, rektajn parolajn kaj vidajn interkontaktilojn.

Fine, rilate al la estonto de Esperanto, mi tute konsentas kun la ĉiam validaj vortoj (*) de d-ro Zamenhof, kiujn mi rememorigas al ĉiuj legantoj:

(*) „Kiam niaj posteuloj legos en la historio, ke la homoj, tiuj ĉi reĝoj de la tero, tiuj ĉi plej altaj reprezentantoj de la monda inteligenteco, tiuj ĉi duon-dioj, en la daŭro de tutaj miljaroj vivis unuj apud la aliaj, ne komprenante unuj la aliajn, ili

simple ne volos kredi. "Por tio ĉi oni ja bezonis nenian supernaturan forton", ili diras; "ĉiu el tiuj ĉi homoj posedis ja kolekton da kondiĉaj sonoj, per kiuj li tute precize kompreniĝadis kun siaj plej proksimaj najbaroj, - kiel do ne venis al ili en la kapon konsentiĝi inter si, ke unu el tiaj kolektoj da kondiĉaj sonoj estu enkondukita por la reciproka kompreniĝado inter ĉiuj, simile al tio, kiel por la plimulto de la kulturaj popoloj estis enkondukita jam longe unu kondiĉa kolekto da mezuroj, unu kondiĉa alfabeto, unuj kondiĉaj muzikaj signoj k.t.p.!" Niaj posteuloj indignos, kiam ili ekscios, ke la homojn, kiuj penadis pri la enkonduko de komuna lingvo, la samtempuloj montradis per la fingroj, kiel maniulojn, bubojn, ne meritantajn la nomon de seriozaj homoj; ke pri tiuj ĉi homoj ĉiu malplenkapulo povis spritadi en la gazetoj, kiom li volis, kaj troviĝis neniuj, kiu dirus al tiuj malplenkapuloj: "vi povas trovi tiujn ĉi ideojn plenumebajn aŭ ne plenumebajn, - sed moki ilin, eĉ ne konatiĝinte kun ili, estas honte, sinjoroj!" Kore ridegos niaj posteuloj, kiam ili aŭdos tiujn naivajn kontraŭparolojn, kiujn multaj el niaj samtempuloj faradis kontraŭ la ideo de lingvo internacia entute kaj de lingvo arta speciale. Simile al tio, kiel ni kun rideto de kompatato rilatas al tiu el niaj pra-praavoj, kiu antaŭ kelke da miljaroj eble protestis kontraŭ la enkonduko de arta alfabeto, kriante kun la aplombo de instruitulo, sed tute senpruve, ke rimedo por la esprimado de niaj pensoj estas objekto organa, natura, kreita de la historio (skribado per hieroglifaj desegnaĵoj) kaj ne povanta "esti kreita en kabineto", - tiel niaj posteuloj mokados tiujn niajn samtempulojn, kiuj nur pro tiu nenion diranta cirkonstanco, ke la nunaj lingvoj kreiĝis blinde per si mem, aŭtoritate certigas, ke lingvo ne povas esti kreita arte. "Ĝis nun ne estis, sekve ne povas esti!" - "Kiel mi povas kredi", diras en la venonta centjaro ia dekjara lernanto al sia instruanto, "ke ekzistis homoj, kiuj

neadis la eblecon de ekzistado de arta lingvo, kiam antaŭ ilia nazo tia lingvo jam ekzistis, havis jam riĉan literaturon kaj bonege plenumadis jam en la praktiko ĉiujn funkciojn, kiujn oni povas postuli de lingvo internacia, kaj tiuj ĉi sinjoroj, anstataŭ babiladi ĉiam teoriant sensencaĵon, bezonis nur malfermi la okulojn kaj ekrigardi! Ĉu estas eble, ke homoj maturaĝaj parolus ĉiam frazistan

sensencaĵon pri ia diferenco de la voĉaj organoj ĉe la popoloj, kiam ĉiu infano vidis sur ĉiu paŝo membrojn de unu popolo, bonege parolantajn en la lingvo de alia popolo!" Kaj la instruanto respondos: "Ĝi estas efektive nekredebla, kaj tamen ĝi tiel estis!"

(Eltiraĵo el Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia, 1900)".*

Komentario

Mi scias, ke tiel mallonga intervjuo ne povas enhavi ĉiujn gravajn eventojn, agadojn kaj okazadojn, kiuj karakterizas d-ron Romano Bolognesi. Tamen tiu intervjuo, ĉefe la respondoj de li, iomete bone prezentas al ni la multflankan homon, kiu estas informita pri multaj terenoj de la vivo. Li estas inteligenta kaj interesiĝanta homo, kaj siajn konojn, sciojn, spertojn li povas hele kaj precize formuli, koncepti kaj konigi. Lia longa kaj efika agado en la kadro de la Esperanto-movado, ĉefe en la fervojista movado atestas tion, ke li estas unu el la plej elstara eminentulo de Esperantujo.

Mi povas paroli pri Romano Bolognesi kun la plej profunda estimo, kies agadon, lojalon kaj amikecon mi ege alte taksas. Mi fieras, ke mi rajtas diri, ke li estas mia malnova kaj vera amiko. Mi deziras al li bonan sanon, multajn sukcesojn kaj en la Esperanto-agado, kaj en la privata vivo.

István Gulyás

FAKAJ INFORMOJ

Kreskis la nombro de la pasaĝeroj

Post dek-jara malfavora tempo dum la pasintaj jaroj kreskis la nombro de la fervojaj pasaĝeroj, eĉ kreskis la mezvalora pasaĝerkilometro. Pli multaj veturis per InterCity trajnoj, pli polulariĝis la nombro, kiuj aĉetas vojaĝbiletojn per elektra interreto. Same favora estas la statistiko pri la internaciaj veturadoj.

*

Evoluigo de la liverado

MÁV kontinue evoluigas siajn liveradojn. Per la modernigo de la biletvendada sistemo MÁV faras ĉiam pli rapida kaj simpla la aĉetadon de la vojaĝkaj abonbiletoj. MÁV kreskigas la mombrojn de la giĉetaj biletpresmaŝinoj. La novaj aparatoj unuigas la taskojn de la ĝis nun funkciaj giĉetaj kaj la interretaj biletmaŝinoj. Per tiu ĉi modernigo la biletvendado fariĝas pli profita.

Senpaga uzo de interreto

Ĉiam pli multaj fervojaj pasaĝeroj bezonas la surtrajnan uzad-eblecon de interreto, ja oni deziras utiligi sian veturan tempon. Pro tio MÁV-START kreskigas la nombron de tiuj vagonoj, sur kiuj la pasaĝeroj povas utiligi senpage la interreton sur InterCity kaj antaŭurbaj trajnoj. La fervojkompanio aprobis kontrakton kun la firmo 'Magyar Telekom Nyrt.'. Jam la 'MÁV-Gépészet Zrt' komencis la muntadan laboron. Ekde pasintjara septembro jam tiaj veturiloj trafikis sur la itinero Budapest-Keleti-Miskolc-Nyíregyháza-Debrecen-Szolnok-Budapest-Nyugati.

*

Akordigitaj evoluigoj sur la itinero Nurenbergo/Drezdeno-Budapest-Szofio-Ateno.

Per la organizado de MÁV – aŭtune de la pasintjaro – internaciaj korporacioj kunsidis en Budapeŝto pri la evoluigo de la fervoja koridor-zono Ateno-Sofio-Temesvár-Budapeŝto-Hegyeshalom.

MÁV Zrt – kunlabore kun la greka, bulgara kaj rumana fervojoj – partoprenas en la laboro de la emfaze grava fervoja projekto n-ro 22 de TEN (Transeŭropa Trafika Reto). Tiu laboro okazas per la ekonomia subteno de TEN. La fakministerioj de la koncernaj landoj kaj la Eŭropa Komitato kontinue atentigas kaj helpas tiun laboron.

La ĉeestintaj membroj de la Eŭropa Komitato referis pri la 2014-2020-jara preparlaboro, speciale okupiĝis pri la limtransiroj, farendaj aranĝoj.

*

Deviga krombileto ĉe rapidtrajnoj

Kaze de vojaĝoj per rapid- kaj eksprestrajnoj ekde la 15-a de majo estas deviga aĉeti krombiletan. La prezo de la krombileto varias laŭ km-zonoj. La krombileto ne rezervas sidlokon.

*

Renovigitaj rapidtrajnaj vagonoj

Dum la sekvaj jaroj MÁV daŭre rekonstruadas la rapidtrajnajn vagonojn por rezervi pli komfortajn cirkonstancojn al la pasaĝeroj. La ĝis nun rekonstruitaj vagonoj veturas sur la linioj Budapeŝto-Miskolc-Sátoraljaújhely/Nyíregyháza, Budapeŝto-Debrecen-Nyíregyháza-Záhony, Budapeŝto-Szolnok-Békéscsaba-Lökösháza, Budapeŝto-Cegléd-Kecskemét-Szeged. La rekonstru-laboro koncernas la unua- kaj dua-klasajn vagonojn, resp. kupeajn kaj grandkupeajn vagonojn. Renovigas la internaj areoj, oni ŝanĝas la tegaĵojn de plankoj, la teksaĵojn de seĝoj je netriviĝa; same oni renovigas la izoladon de fenestroj kaj pordoj, oni kovras la vitrojn per specialaj varm-izolaj folioj. Per speciala materio oni ŝmiras la eksterajn surfacojn kontraŭ grafikaĉado.

*

Lokomotivo de Reĝo Matiaso

D-ro Pál Völner, la ŝtatsekretario de Nacia Evoluiga Ministerio la 2-an de majo

en stacidomo Budapeŝto-Nyugati inaŭguris lokomotivon sub nomo „Lokomotivo de Reĝo Matiaso”; nome Matiaso Hunyadi antaŭ 555 jaroj estis elektita reĝo de Hungario.

Sur la lokomotivo videblas la t.n. Hunyadi-blazono, portreto de reĝo Matiaso, la fortikaĵo de Vajdahunyad kaj la palaco de Visegrád. Tuj post la inaŭguro la lokomotivo „ekdeĵoris”, nome ĝi veturigis la InterCity trajnon al Szolnok-Debrecen-Nyíregyháza-Miskolc.

S-ro Völner en sia festparolo emfazis, ke: „La fervojo vivas sian renesacon en Hungario kaj en tuta Eŭropo, kion demonstras la daŭran evoluigon de la fervoja infrastrukturo. Krom la laŭhoraraj pasaĝer-vagonaroj ĉiam pli popularaj estas la t.n. „pilgrim-trajnoj”, specialaj trajnoj, kiuj kreskigas la nimbon de la fervojo, eĉ ankaŭ la „Lokomotivo de Reĝo Matiaso” faros tion ene kaj trans landlimoj.”

Tiu ĉi estas la tria kliŝite ornamita lokomotivo de MÁV, sed tiu estas la unua, kio regule trafikas eksterlanden. En la solenaĵo Ilona Dávid, la prezidantino de MÁV deklaris: „Eĉ pro tio eksterordinara estas la Matiaso-lokomotivo, ĉar ofte veturos al Rumanio, ja pasintjare la hungara kaj rumana naciaj fervojkompanioj interkonsentis trafikigi trajnojn inter Budapeŝto kaj Bukarest sen lokomotiv-ŝanĝo ĉe la landlimo. Ene de Eŭropa Unio tiu ĉi fakto helpas la kontinuecon de la fervoja trafiko, la malkreskigon de la internacia veturtempo, tio malfermas novaĵon ĉe la fervoja trafiko inter Hungario kaj Rumanio”.

*

Oni rekonstruas la relvojn inter Hatvan-Miskolc

Oni rekonstruas la relvojn zonan inter Hatvan kaj Miskolc. Post la fino de tiu laboro la trajnoj povos veturi per rapideco de 160 km/h. La rekonstru-laboro efektiviĝos parte de financa subteno de Eŭropa Unio.

*

Kompilis: **János Patay**

JÓZSEF CZIBOLY

(1937-2013)



Profunda funebro ekregas la fervojistan esperantistaron: la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio kune kun la funebranta Familio ĉagrene anoncas, ke aŭrore de la 27-a de aprilo 2013 la morto etendis sian manon al József Cziboly.

Li naskiĝis la 15-an de oktobro 1937. Post lia abiturienta ekzameno li finstudis la teknikan fakul-ton de la 'Eötvös Lóránt' Scienca Universitato de Budapeŝt, kaj akiris inĝenieran diplomon pri ponto-konstruado. Li komencis sian inĝenieran karieron ĉe MÁV. Dum lia fervoja deĵoro li ekkonis kaj alproprigis la Internacian Lingvon Esperanto, kaj poste kun granda entuziasmo li tuj aliĝis al la movada laboro.

Post jardeko da profesia laboro ĉe MÁV lia sorto direktis lin al alia entrepreno, sed ankaŭ tie li laboris laŭ sia speciala profesio. Malgraŭ la ŝanĝo de laborejo tamen li disrompis siajn kontaktojn nek kun la iamaj fervojistaj kolegoj, nek kun la Esperanto-movado.

Jam komence de lia esperantista kariero li saltis „en profundan akvon”: ekde 1980 la organizaj laboroj kaj la entrepreno de ĝiaj efektivigoj de la budapeŝta 14-a IFEF-Kongreso (1962) kaj pli poste la 51-a Universala Kongreso (1966) donis al li grandajn kaj respondplenajn taskojn, kiujn li ekzemplodone efektivigis – eĉ per tiu li kontribuis al la estigo de la reputacio de la hungara Esperanto-movado. Dum la 14-a IFK fondiĝis „Junulara Sekcio de IFEF”, kaj la kongreso elektis lin membro de ĝia estraro.

Kvankam la ŝanĝiĝo de lia laborejo provizore moderigis lian Esperanto-movadan aktivadon, tamen ekde la komenco de la organizado de la 1982-jara 34-a IFK kun intensa forto li reaktivadis, eĉ seninterrompe ĝis la lasta tago de lia vivo. De tiu tempo en ĉiuj IFEF- kaj UEA-kongresoj – aranĝitaj en Hungario – li prenis al si diversajn gravajn taskojn (redaktadoj de kongreslibroj kaj kongresaj bultenoj, ĉiĉeronadoj k.a.). Post tiuj kongresaj laboroj fervore kaj rezulte li penadis plu. Per la lingva reviziado de la faka revuo 'Hungara Fervojista Mondo' li akcelis la kreskigon de ties lingva

nivelo, kaj kiel enpaĝiga redaktoro evoluigis la estetikan formon de la periodaĵo. Ekde la j. 2010 li alprenis al si la samajn taskojn de la oficiala bulteno de IFEF 'Internacia Fervojisto', kaj akiris rekonon en la rondo de la fervojistaj esperantistoj de la mondo. Dum la lastaj du jardekoj ĝenerale li kunlaboris, partoprenis la estrarkunsidojn de la landa organizo, per utilaj ideoj li helpis la laboron de la movado; eĉ dum la lasta periodo li estiĝis estrarano de nia asocio. Dum la 51-a Universala Kongreso la Hungara Radio ĉiutage disaŭdigis duonhoran Esperanto-lingvan informon, li estis membro de ĝia trikapla redaktararo. Li partoprenis multajn IFEF- kaj UEA-kongresojn aranĝitajn en eskterlando, eĉ plurfoje li reprezentis la hungarajn fervojistajn esperantistojn kiel anstataŭanto de la hungara komitatano. Je la bono de la Esperanto-movado li akiris la kontinuan subtenadon de la estroj de sia laborejo. Li ne konis limon pri la laboro, ĉiam li klopodis precize labori. Liaj homaj kontaktoj ĉiam estis ekzemplodonaj, li ŝatis esti en la fono, mallaŭta voĉo kaj bonhumoro karakterizis lin, el profunda koro li povis ridi eĉ pri bagatelaj aferoj.

Lia edzino Anikó ĉiam helpis lin per siaj ideoj, konsiloj kaj entuziasmo en lia movada laboro.

Pro lia rezultohava laboro plurfoje li ricevis honorigojn, ja la afero de Esperanto ĉiam estis tre grava por li. La Hungara Esperanto-Asocio distingis lin per la honorigo „Pro Esperanto” (1996), okaze de la 40-a postmilita jubileo li ricevis „Honordiplomo”-n de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (1997), kaj en 1998 li ricevis la distingon „Honorinsigno de HEA”.

József Cziboly, nia kunlaboranto kaj Amiko foriris je eterna ripozo. Estas terura sento, ke ĉio kio estis, iam forpasas. Oni malfacile, tamen devas kompreni kaj akcepti, ke kordoloro kaj ĉagreno sekvas la sukcesojn.

Dum la komuna pli ol trijardeka diligenta laboro nia koro estis kune kun li, sed tiu koro nun tre doloras. Li postlasis grandan spacon, sed per memoro ni anstataŭigas la mankon de Li.

Li ripozu en paco!

En la nomo de la fervojista esperantistaro ankaŭ ĉi-maniere kondolencas al la funebrantaj Vidvino kaj lia Familio, la

**Hungara Fervojista Esperanto-Asocio,
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio**



La stacidomo „Gare d’ Est” en Paris



La 66-a kongreso de IFEF okazos de la 17-a ĝis la 24-a de majo

2014 en Italio en la urbo San Benedetto del Tronto.

Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.